



Enhavtabelo	Paĝoj
Tiu romano de Christian Fulas okazas en la rumanaj Karpatoj, belega regiono de tiu lando, kie situas Brasov, urbo ĝemeligita kun Tours.	1 kaj 2
En tiu novelo ne homo sed objekto rakontas sian historion kaj donas okazon por starigi al ni kelkajn demandojn : ĉu objekto povas suferi pro sia malsano ? ĉu objekto povas ami aŭ abomeni iun ? ĉu objekto havas animon ?	2 3 4 kaj 5
Kiu ne konas la Davidon de Mikaelanĝelo aŭ la kliniĝantan turon de Pizo ? Sed ĉu vi scias, ke ili estas faritaj tute aŭ parte el la marmoro de Carrare, itala urbeto de la apunaj Alpoj ?	6 7 kaj 8
Kelkaj fakoj ne havas Nobel premion, sed ekvivalenton. Por arkitekturo temas pri la Pritzker premio, kies laŭreaton 2024 ni prezentas al vi.	8

Romano.

Iochka, la maljuna viro kaj la trajno

En « Iochka », la romanisto Christian Fulas priskribas la vivon de maljuna viro loĝanta en sennoma valo de la rumanaj Karpatoj, kien li venis por konstrui por ĉiam nefinitan fervojlinion.

Tiu romano kun ekzalta prozo kondukas nin en la historio de Rumanio, sed ankaŭ kaj precipe en la kurbaj vojoj de la homa animo.

La maljuna Iochka vivas sola en sovaĝa valo de Karpatoj. Por vivi plu, li produktas lignokarbon kaj restas plej ofte sidanta sur sia benko, trinkante silente. Li trapasis la jarcenton, havis plenan vivon kaj la tempo venis por memori. Li malkovris tiun perditan valon, kiam li estis dungita por partopreni la konstruon de fervojlinio. Jaron post jaro, la laboroj daŭras, la konstruejo etendiĝas, sed la fervojo alvenas nenien :

« Senfina blago, ĉar ripetita al ĉiuj tiuj, kiuj volas aŭskulti, estis, ke ilia vivo malaperinta iris al fiasko ; blago destinita por laboristoj, simplaj laboristoj, kiuj iafoje faris sian eblon por konstrui kaj funkciigi la fervojon, sur kiu malsuprenveturis etaj trajnoj ŝarĝitaj de trunkoj. Sed plej ofte la valo similis al ferirestadejo, kie la homoj allasis sin al drinkado kaj nenifarado, aktivaĵoj levitaj laŭ la fluo de la tempo al rango de arto. Estis tie centoj da laboristoj, kaj normale tiu fervojo povus esti konstruita en kelkaj monatoj, maksimume unu jaro, sed la laboro jam daŭris de deko da jaroj kaj ne

estis la plej malgranda risko, ke la reloj reale iam transpasos la lokon, kie troviĝas la domo de Iochka kaj ankoraŭ malpli progresos en la malantaŭa montaro kaj atingos la ekstremon. »


En tiu sekreta valo la vivo ne havas la saman guston kiel aliloke. Kun la skipestro de la konstruejo de la fervojo, la kuracisto, kiu direktas la psikiatrian hospitalon kaj la popo, kiu regule malsupreniras el sia ermitejo, Iochka drinkas. Plej ofte en la plej paca silento, eĉ se la kuracisto kaj la religiulo regule forte disputas. Baldaŭ – kulmino de feliĉo por Iochka- lia granda amo, la bela Ilonna, revenas al li en lian valon. Tiam la du amantoj libere vivas sian pasion, nur submetitaj al la fluo de la tempo, kiu pasas.

Unua romano tradukita en la francan de la verkisto Christian Fulas, kiu estas ankaŭ eldonisto kaj tradukisto, Iochka estas himno al amo, amikeco, silento kaj naturo.


Iochka kaj ties proksimuloj vivas en sia propra spactempo, izolaj, sed liberaj kaj precipe firme vivantaj : « *Paradizo de antaŭ kaj post la katastrofo, kiu estas ĉiam la civilizo, loko forgesita kaj pro tiu sama kialo, neforgesebla, senmorta kaj vivanta laŭmezure, kiel vivaĵo en ĝia plej esenca parto ĉiam eskapos el la homa kompreno. Paradizo, kiu atendis la morton, nenion pli. »*

La recenzon de Samuel Delziani, aperintan en La Vie du Rail de la 10a de majo 2024 tradukis Jean-Mary.

Iochka de Christian Fulas. Tradukita el la rumana de Florica kaj Jean-Louis Courriol. 10/18. Rumanio. (2024) Prezo : 9,60 eŭroj.



Ŝnuroj kaj animo de Patrick PORIZI



Arsenalo de Chatham ĉirkaŭ 1830

Mi estas ŝnuro kaj mi estas rakontonta mian historion. Vi diros al mi, ke ŝnuroj ne parolas. Estas vere sed tamen ni havas animon. Ĝi povas esti firma, rezista, supla, kanta, malmola, elasta... La mia estas rompiĝema.

Mi naskiĝis en Anglio en 1877, precize en Chatham, en ŝnurfarejo ĉe la bordo de la Medway rivero. Ne demandu min pri la tago kaj la monato, mia memoro malbone funkcias. La fabriko, kiu naskis min, situis nur kelkajn

kilometrojn for de la enfluejo de la Tamizo, tiu malfermita faŭko direktita al la brita imperio. Mi estas infano de ŝtalo kaj vaporo, eliĝinta el la ŝvitanta ventro de maŝino, kiu malbonodoris grason. Mi naskiĝis blonda kiel kanabo, el kiu mi estas farita. Mi estis tiel bela kiel miaj fratoj, sed, pro kaŭzo, kiun mi ignoras, mi ŝirmis en mian sinon teruran fabrikdifekton, genetikan ŝnuranomalion : rezisteco kontraŭ tiro multe pli malforta ol mia diametro lasis supozi. Tiu denaska misformaĵo estas maloftega en la ŝnuroj, laŭdire, sed perokule ĝi estas nevidebla, ĉar ĝi trafas la animon. Ne gravas, mia generinto bonafide vendis min al maristo. Tiam mi estis dudek metrojn longa, t. e. dek unu klaftojn – la Angloj dirintus *eleven fathoms* – kaj mi estis spiralvolvita en perfekta cirklo. Male al vi, la homoj, la ŝnuroj ne plu grandiĝas post la naskiĝo. Ili eĉ havas tendencon al mallongiĝo laŭ la cirkonstancoj. Min oni uzis por hisi la antaŭmaston sur malgranda fiŝkaptoboato – catboat – ankrita en la haveno Ramsgate, tridek kvin mejlojn oriente de mia naskiĝurbo.

En la Manika maro mi travivis la plej belajn monatojn de mia juneco. Mi lernis kanti kun la vento, danci kun la maro. Salo kaj suno glatumis miajn fibrojn, la manoj de maristoj poluris ilin kiel la rulŝtonetoj sub la ondaj karesoj. Jes, mi estis feliĉa, mi povintus fini mian vivon borde de la maro, ŝirmita por ĉiam kontraŭ la putrado pro la salo, kiu penetris min. Sed oni ne povas eskapi el sia destino. Matene de oktobro dum la boato estis irinta al marvastato, la vetero subite malboniĝis. Pluvo kaj ventopuŝoj kreskigis la premon sur la velo. Fulmtuje mi sentis en mi teruran vakuon malfermiĝi, ŝiriĝon,



kiu ŝangis mian vivon por ĉiam. Proksimume du metrojn for de la ligopunkto de la antaŭmasto, mi cedis. La ligna peco falis sur la ferdekon kiel martelo, frakasante la kranion de dudek du jarojn aĝan skipanon. Sen tolo la boato iĝis neregebla en la malkvieta maro. Eblis eviti la boatpereon dank al la memregon de du ankoraŭ laborkapablaj fiŝkaptistoj, kiuj povis urĝe improvizi provizoran rigon. Post mia reiro al la haveno oni ĵetis min kiel pakajon en malhelan kaj malpuran kabanon. Mi ja sentis, ke oni volas pentigi min pri la morto de senkulpulo. Mi restis tie dum monatoj. Iam oni prenis min kaj vendis al junulo kontraŭ kelkaj ŝilingoj. Mi estis ankoraŭ vigla kaj mia sana mieno verŝajne konvinkis mian novan posedanton. Mi vojaĝis en sako ĝis Londono, al kroĉita sur la tegmento de diliĝenco. Mi ankoraŭ neniam kontaktis la poluitan aeron de granda urbo. Malkovrante la *smog* mi adiaŭis la sunon. Mia brunigita kolorvizaĝo ŝanĝiĝis en haŭto de nedifinebla koloro, inter senbrila kaj palega. Mi bezonis nur kelkajn tagojn por malkovri la intencojn de tiu, kiu estis aĉetinta min. Pasiginte du noktojn en improvizitaj ŝirmejoj li luprenis mizeraspektan dormoĉambron ĉe gastigistino en la *East End*. La morgaŭon posttagmeze li fiksas unu el miaj ekstremoj al kroĉilo enmasonigita en muro kvin metrojn super la grundo kaj la alian al ligna balkono sur la dua etaĝo de la domo, tiel ke mi estas streĉita tra la strato sen ĝeni la trafikon. Mia mastro paciencis ĝis la popolaĉo fine de posttagmezo forlasas sian sklavan kondiĉon. Poste li aperis sur la balkono. Superstarante la grandiĝantan homamason de laboristoj revenantaj hejmen, li alparolis ilin per voĉo de konsulo antaŭ la batalo. Tio estis la ĝusta tempo : la povruloj ankoraŭ ne fordrinkis sian tagsalajron en trinkejo. Kiel mizeraj kaj lacaj estis tiuj punlaboruloj de la industria revolucio. Endas diri, ke en Londono rato elsaltanta el rubaĵamaso vekas pli da emocio ol *East Ender* piediranta en *Westminster*. Sed ili tamen levis la okulojn al tiu, kiu ekiris sur mi silentpaŝe, tenante longan stangon en siaj manoj. Ekkrioj eliĝis, kiam la gapuloj vidis la ŝnurdanciston oscili meze de la irvojo kaj reiri. Alveninte al la alia ekstremo, eksaltante li perfekte iris returne kaj trapasis denove la straton sen malfacilaĵoj. Li salutis, rikoltis kelkajn aklamojn, sed multe malpli da moneroj en sia ĉapelo. Li rekomencis trifoje poste forlasis min tie por la



nokto. Mi konfesas, ke mi estis streĉita, kiam li metis siajn piedojn sur min unuafoje. La postan tagon li rekomencis. Sed dum la reveno el la dua irvojo – sendube por impresi la ĉeestantaron kaj pliigi sian gajnon – li pretendis fari eksalton meze de la strato. Kio laŭ vi okazis ? Surprizita de la ekstrema streĉo presita sur miaj fibroj en tiel mallonga momento, tri klaftojn for de la kroĉilo mi cedis. La ekvilibristo maltenis sian stangon kaj falis kiel ŝtono sub la hurloj de la publiko. Malsonora bruo sur la malpuraj pavimoj de la strato kaj nenio plu. Li ne plu moviĝis. Li estis mortinta. Gapulo levprenis mian plej longan ŝnureron, kiu treniĝis meze de la ŝoseo kaj ĵetis min surflanken. La polico disigis la homamason kaj igis forpreni la korpon de la ŝnurdancisto. Mi restis tie ĝis la vespero antaŭ ol la gastigistino venis por malkroĉi min. Ŝi ŝajnis furioza, ĉar ŝia luprenanto neniam plu pagus al ŝi la du malfruajn lutagojn. Ŝi demetis min sub flankremizon kaj jam la postan tagon ŝi revendis min al transportisto. Mia nova posedanto uzis min por stivi la kargojn sur sia ĉareto tirata de kaprica mulino. En tiu epoko, amputita pro la du akcidentoj, mi ne longis pli ol sep klaftojn. Sed mia longo ankoraŭ larĝe sufiĉis por la funkcio, kiu estis plenumenda de mi.

Dum jaroj mi havis rutinan ekziston laŭ la liveradoj. Mi trairis Londonon ĉiudirekte, skuita sur malebenaj vojoj. Mi sentis min utila kaj ne plendis.

Dum iun tagon mia nova mastro kondukis sian jungitaron sur kava vojo, ĉe la periferio de la urbo, li renkontis maljunan viron sidantan sur la taluso, apud sia brakĉareto. Li ŝajnis elĉerpita de la peno kaj iom ripozis. La transportisto, dezirante helpi lin, proponis al li treni lian ĉareton. La maljunulo akceptis. Tiam mia mastro malligis min kaj uzis min kiel trenŝnuron. Ni denove ekiris trenante la ĉareton kun la maljuna viro sidanta sur ĝi. Mi povis elteni la penon, kiun on petis de mi, ĝis la piedo de la deklivo. Sed ĉe la tri kvaronoj de la suprenirado mi sentis, ke mi atingis mian rompiĝosojlon. Mi denove rompiĝis. La brakĉareto rapide malsupreniris la deklivon, elĵetante sian pasaĝeron, kiu rompis al si la kolon falante sur la grundon. Konsternita de la evoluo de la eventoj, mia mastro hezitis. Ĉar neniu atestanto alia ol li mem ĉeestis la scenon, li decidis vergi sian mulinon kaj malproksimiĝi inkognite. Li forlasis la plej mallongan eron kaj ĵetis min senorde sur la kargon de sia ĉaro. Post la reveno urben, li taksis mian longon malvolvante min, sed mi vidis laŭ lia mieno, ke mi nun estas sentaŭga. Mi iĝis tro mallonga. Li ĵetis min surgrunden per gesto de malestimo kaj malaperis. Levprenis min bubo la postan tagon. Li spiralvolvis min en regulajn spiralarojn kaj portis min transverse de sia busto ĝis la domo, kie li loĝis. Unuafoje mi metis miajn ŝnurerojn interne de loĝejo. Tie vivis familio konsistanta el virino, kriaĉanta bubaro kaj edzo okupata ekstere. Mia malkovrinto delikatece demetis min surgrunden, bone videbla sub fenestro. Neniam oni montris al mi tiom da konsidero. Mi atendis, ke la famaliestro alvenas fine de la posttagmezo, por ke oni denove interesiĝu pri mi. La bubo kuntiris sian patron per la maniko kaj, tre fier,





montris al li sian trovaĵon. La viro prenis min en siaj manoj, submetis min al diversaj tordomovoj, kaj fine kapjesis. Mi havis novan mastron. Li transportis min en la kelon kaj forlasis min tie dum tre longa tempo. Li estis zorgeme spiralvolvinta min kaj alkroĉinta al la brikmuro, apud la rezervo el karbo. En tiu humida loko lumigata de mallarĝa kelluko mi atendis informon pri mia sorto. Iun matenon frue – mi memoras, -tio okazis en aprilo 1885 - la viro malsupreniris en la kelon, malkroĉis min kaj lokis min en tolsakon. Li eligis min el ĝi unu horon poste kaj okupiĝis pri kurbigo de unu el miaj ekstremoj en striktajn spiralerajn. Poste li fiksas min al trabo superanta estradon en ĉambro, kiun mi ne konis, sed kiu ne estis en domo. Resume jen la ekzekutisto ĵus alkroĉis min al la pendumilo. Mi pendis la tutan nokton super la estrado. La kondamnito alvenis la postan tagon matene ĉe la ektagiĝo, eskortata de taĉmento da viroj en uniformo aŭ surportantaj ĉapelon. Lia kapo estis kovrita per poŝo el teksaĵo kaj li havis la manojn kunligitajn post la dorso. La ekzekutisto helpis lin supreniri la ŝtupojn. Okazis mallonga parolado. Poste la ekzekutisto metis mian plej grandan spiraleron ĉirkaŭ la kolon de la kondamnito. Mi sentis lian varmon kontraŭ mi. Mi konfesas, ke tiu proksimeco, tiu intimeco kun li perturbis min. Kiam la klappordo malfermiĝis kaj li pezis sur mi per

sia tuta maso, mi krakrompiĝis. Li peze falis surgrunden sed vivanta. La ekzekutisto gratis al si la kapon kaj faris nodon per la du rompitaĵoj. Kaj li denove provis. Mi ĝuplene rompiĝis duan fojon. La ekzekutisto eligis sakraĵon, senkulpigis sin antaŭ la oficialuloj, kaj haste denove kunligis la du pecojn. Kiam la klappordo malfermiĝis la trian fojon, ĉiuj retenis sian spiron. Krom la kondamnito. Kiam mi denove cedis, mi ĝuis grandegan plezuron – mi kredas, ke vi homoj nomas tion orgasmo – la unua kaj lasta de mia mallonga vivo. En Anglio se la pendumado malsukcesas trifoje, la mortpuno estas mildigata en malibereco laŭ la leĝo. La ŝtofpeco, kiu kaŝis la kapon de la kondamnito estis demetita. Mi vidis la viron spiti la oficialulojn per la rigardo kaj kraĉi surteren. Li forlasis la ĉambron lametante sed ridetante.

Hodiaŭ mi kuŝas sur forlasita tereno. Mi longas ankoraŭ nur unu klafton kaj duono. Iun tagon mi estos fine kovrita de la terforigoj de alia konstruaĵo. Restas nenio el mia blondeco, pri kiu mi estis tiel fiera. Mi fariĝis griza kaj pli kaj pli rompiĝema sub la ago de la pluvo kaj pli malofte de la suno. Ratoj venas ronĝeti miajn spiralerajn por rekuperi remburadon. Tiam por forgesi la indeferentecon kaj malpurecon, en kiuj mi putras, okazas al mi kelkfoje repensi pri la pasinta tempo. Tri viroj mortis pri tiu malforteco, kiu obsedas min de mia naskiĝo. Kaj nur unu ŝuldas al mi la vivon. Se mi estintus elpensita sen difekto, ĉu la bilanco de mia vivo estintus pli bona ? Nur unu viro eble mortintus pro mia kulpo. Se mi povintus elekti, kiun animon mi metintus centren de miaj fibroj ? Sed mi konfuziĝas, mi faras al mi nodojn. Fakte mi konas la respondon... Mi eksciis, ke de la jaro 1800, preskaŭ trimil kvincent personoj estis pendumitaj en Anglio kaj malpli ol la duono el ili pro murdo. Solidaj, neputremaj, sendifektaj estas la ŝnuroj, kiuj forprenis de ili la vivon. Nur mi rompiĝis sub la pezo de kondamnito al morto. Mi devus honti pro tio, laŭdire. Tamen ĝis mia malapero mi vivos kun tiu milda varmo, kiun miaj sendifektaj fratoj neniam konos, varmo per kiu nutras sin ĉio, kio havas animon surtere : bona aŭ malbona, kulpa aŭ senkulpa, iu amis min.

Tiun novelon aperintan en la retejo short-edition.com tradukis Jean-Mary.

Marmoro de Carrare, trezoro tre avidata

Tiu purega petro inspiris la plej grandajn Renesancajn skulptistojn, kovris la plej luksegajn situojn kiel tiun de Taĝ Mahalo en Hindio. Ekstraktata el la ŝtonminoj en la ĉirkaŭaĵo de la itala urbeto Carrare, ĝi estas de nun objekto de intensiva, industria ekspluato.



Laboristoj estas laborantaj en la marmorminoj de Cervalole, meze de la montaroj de Seravezza en Toskanio (Italio).

En Italio, oni trovas montarojn magie blankajn : estas la apunaj Alpoj, sulkitaj de torentoj polurantaj la rokon de jarmiloj. Estas sur tiu « grundo riĉa je marmoroj » (*dives marmoribus tellus*), kiel priskribis ĝin la poeto Namazianus je la 5a jarcento, ke la Romianoj konstruis sian imperion. Tiuepoke la marmoro de Luni (nomita laŭ la nomo de la eksa haveno) estas konsiderata kiel unu el la plej puraj, la plej blankaj kaj la plej valoraj materialoj en la mondo. Ĝi tia postrestos. Estas tiu, kiun Donatello kaj Mikelaĝelo uzas je la Renesanco. Estas ankaŭ ĝi, kiun oni trovas en la Freedom Tower en Novjorko, en la Operejo de Oslo, la Taĝ Mahalo, Hindio, kaj la Kapitulo en Vaŝingtono DC. En 2023 ĝi pezas 25 miliardojn da eŭroj ĉe la internacia petra merkato, tio estas 22% de la monda produkto. Ekzistas pluraj specoj, Calacatta, Bianco di Carrara kaj Statuario. Certe ja, kun la enkonduko de novaj teknologioj, la penigeco treege malgrandiĝis kaj, ĉefe, la ekstraktado de tiu materialo akceliĝis eksponencie : oni ekstraktadis pli da marmoro dum la lastaj tridek jaroj ol dum la du antaŭaj jarmiloj. Nur tre malforta procento estas destinita por la arta mondo (artistaro) (1%). Granda parto servas por arkitekturo kaj la dekoracio, sed pli ol la duono estas destinita por la fabrikado de la pulvoro de kalcia karbonato, uzata por multaj aplikaĵoj : de nutra industrio al paperfabrikado, de cimenta produkto al agrikulturo, de farbo al kosmetikaĵoj, de sterkaĵoj al blankigaj agentoj por dentopasto. Intensiva ekspluato, kiu maltrankviligas la defendantojn de la medio.



Vidaĵo al la marmorminoj, kiuj superstaras Carrare-n, norde de Toskanio. De la romania epoko, artistoj sin sekvas en tiu urbo monde konata, pendants inter la maro kaj la apunaj Alpoj, por elekti la pecon de « blanka oro », kiu perfekte taŭgos por kreado de siaj ĉefverkoj.

Laŭ la montoflankoj de kuŝejoj, loko por historia reelvoko de lizzatura. Tiu tradicia metodo estis uzata dum jarmiloj por deloki enormajn blokojn el marmoro permane nur pere de kabloj, ŝnuregoj kaj lignaĵoj.



3 En urbo Querceta, la entrepreno Henraux estas institucio. Evidentas la kialo : estas unu el la plej malnovaj en la kampo de ŝtonmina ekspluatado kaj de marmora transformado. La laboristo Ivano Borghini laboras ĉi –tie de 34 jaroj, en la sekcio de polurado.



4 Ĉe Granulati Carrara, granda parto el la marmoro ekstraktata de ŝtonminoj estas transformita en pulvoron kaj uzita tutmonde en multaj kampoj : industria, agrikultura kaj nutraj. Do, laboriloj ofte estas kovritaj de blanka pulvoro de kalcia karbonato. Vidu la foton dekstre supre de la paĝo.



Sube, skulptisto laboranta en la historiaj atelieroj de Nicoli, funkciaj de pli ol 150 jaroj en la centro de Carrare.



4 En la Galerio de la Akademio, en Florenco, vizitantoj fotas la Davidon de Mikaelanĝelo, simbolon de la Renesanco. Tiu statuo, 5,2 metrojn alta, realigita inter 1501 kaj 1504, estis tajlita el la granda marmorbloko, sed forlasita de jaroj en la korto de la Kupolo, ĉar tro komplika por esti prilaborata de la skulptistoj.



5 En Pizo multaj turistoj prenas diversajn pozojn antaŭ la fama kliniĝanta turo, konstruita en pluraj etapoj inter 1173 kaj 1372. La kolonoj el blanka marmoro de Carrare servas kiel subtenilo por ĉiu el la ok etaĝoj.



Tekstoj kaj fotoj : Alessandro Gandolfi.
Tiun artikolon el la revuo "Le Pèlerin" (10an de oktobro 2024) tradukis Jeannine.

PRITZKER PREMIO

La Japano Riken Yamamoto premiita

Konsiderata kiel la ekvivalento de la Nobelpremio de arkitekturo, la Pritzker premio donis sian verdikton 2024.

Tiun jaron estas la trankviliga arkitekturo de la Japano Riken Yamamoto, kiu estis rekonita de siaj samranguloj. Li estas la naŭa japana laŭreato de la Pritzker premio. Lia laboro ĉefe sur la publikaj konstruaĵoj estas centrita sur la ideo de socia interŝanĝo, de kunvivemo kaj de komunumo. Vidmaniero speciale akordiĝanta kun la nunaj

temaroj. La ĵurio konsideris, ke « *per la forta kaj kohera kvalito de siaj konstruaĵoj li celas doni dignon, plibonigi kaj riĉigi la vivon de individuoj kaj de iliaj sociaj ligiloj* »

Ekzemple li kreis elementan lernejon en Yokohama, kies terasoj kunligas ĉiujn klasĉambrojn kuraĝigante tiamaniere la 1000 lernantojn intermiksiĝi. La travidebleco de lia fajrobrigadista kazino en Hiroshima ebligas al la publiko vidi veturilojn de fajrestingistoj kaj la personaron. Koncerne la artmuzeon de Yokosuka, ĝi donas al la vizitantoj impreson droni en la natura pejzaĝo. Je la enmanigo de sia premio li deklaris, emociita : « Mia celo por longa tempo estas koncepti arkitekturon, kiu povas alporti ĝojon al la homoj » **M.U.**

Tiun artikolon el la revuo « *Le fil des ans* » julio-aŭgusto 2024 tradukis Jeannine.

Sube fotoj de du verkoj de Riken Yamamoto.



La Yokosuka Artmuzeo estis konstruita inter 2004 kaj 2007 en la kanagavo gubernio.



Tio estas la Fussa City Hall en Tokio.